

Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago N°9, Septembro, 2009

Kara Leganto, la redakcio ricevis multajn impresojn pri la lasta UK en naskiĝurbo de la Majstro. Ni ne povas enmeti ĉion en unu solan numeron, pro tio vi havos eblecon plu legi en oktobra numero de la bulteno.

Jubilea UK en Bjalistoko

■ Mi malofte veturas al UKoj: tro grandaj renkontiĝoj ne logas min. Mi preferas malgrandajn. Ke oni povu konatiĝi kun la plimulto de partoprenantoj kaj interbabili. Sed ĉijara UK ja estis escepta: ĝi okazis en la naskiĝurbo de Zamenhof dum lia 150-jara jubileo. Ne veturi ne eblis. Ekde 1973, jaro de mia esperantistiĝo, mi revis viziti LIAN urbon. Kaj mi enamiĝis en la urbon! La Loka kongresa komitato kaj la urbestro faris ĉion ke ni sentu nin hejme: Esperantaj flagoj flirtis ĉie, la kafejon en la centra placo oni nomis "Espero", la tabulo surloke de la iama domo de Zamenhofoj klarigis pri li en tri lingvoj (pola, angla kaj Esperanto)... Sed tio ja estis la plej facilaj taskoj. Alia tre agrabla surprizo: oni vere prepariĝis por gastoj! Ĉu mi iam pensus ke mi staros sur la centra placo de Bjalistoko kaj aŭskultos kiel la profesia koruso kaj orkestro de la Podlaĥia Operejo kaj Filharmonio kantas en Esperanto "Odon al Ĝojo"? Aŭ ke mi aŭdos Esperantan kantadon en la belega urba parko – kie esperantistoj kaj bjalistokanoj povis danci kune aŭskultante JoMon? Aŭ ke la belorusa popolkanta ensemblo kantas en Esperanto "Knabino arbaretan..." – kaj la tuta salono dum la Internacia Arta Vespero kunkantas? Laŭ mi la 94-an UKon oni memoros ĝuste pro tio: ni eliris "el la geto". Esperantistoj miksiĝis kun la loka loĝantaro. La tuta urbo sciis ke okazas la kongreso. Lokaj verkistoj konatiĝis kun Esperantaj verkistoj en la prestiĝa loka biblioteko. Oni aŭdis, kiel sonas poemoj en Esperanto




en polaj tradukoj kaj polaj – en Esperantaj... Esperanton oni aŭdis ĉie – eĉ en la praarbaro de Bjaloveĵo... Eŭropajn bizonojn oni admiris Esperante! Kompreneble, ke "eliro el la geto" en eta urbo provokis ne nur bonan reagon. Okazis ankaŭ malbonaĵoj. Sed pri tio legu en "Libera Folio". Mi revenis el Bjalistoko kun la plej bonaj impresoj kaj renovigita entuziasmo. Dankon al la gastama Bjalistoko – inda naskiĝurbo de nia Majstro!

Olga Kerzjuk, La Brita Biblioteko, kuratoro de E-fako

■ La Jubilea Kongreso ĉi jare okazis en la urbo bela, vigla, juna, pura, moderna kaj kolora, varia kulture kaj religie. La ekstercentrurba universitata kampuso arigis ĉirkaŭ 2000 gesamideanojn de pli ol 60 landoj. Mankis sufiĉe ampleksa salonego, do la granda peciala tendo bone funkciis kiel ĉefkunvenejo, ekipita per modernaj elektronaj teknikiloj. Festante dum la kongreso miajn 50 jarojn kiel esperantisto, mi renkontis tre multajn esperantistajn geamikojn de antaŭaj epokoj. En la urbo la kongreso estis videbla pro esperantaj flagoj sur ĉiu stratlampo, kaj pro pluraj nekutimaj ekzotaj esperantistoj el foraj landoj kiel Kubo, Sudameriko aŭ Orienta Azio. Kvankam junaj bjalistokanoj paradokse kredas je la ekskluziva mondskala uzo de la angla, ili havis la okazon sperti, kiel funkcias Esperantujo. Surloke de la neekzistanta naskiĝdomo de nia Majstro la impona trietaĝa murpentraĵo (kun d-ro Zamenhof sur balkono) restos kiel bela memoraĵo de la Kongreso. Same postrestos aparta Centro de Esperanto, malfermita dum la kongreso.

D-ro Les Kordylewski



■ Dum la kongreso oni plurfoje diris al mi, ke la unua kongreso ĉiam estas la plej bona – kaj mi tute konsentas pri tiu diraĵo. Mia unua UK ja ŝajnas kiel io surreala: mi neniam antaŭe en mia tuta vivo vidis tiom da esperantistoj en unu loko! Dum la solena malfermo estis paroladoj kaj mesaĝoj de Esperantaj, polaj kaj eksterlandaj gravuloj, bonvenigaj vortoj de la nepo de Zamenhof – D-ro L.C. Zaleski-Zamenhof... Estis ege plaĉe vidi la salutojn de la kongreso nome de diversaj landoj (Vilcxjo Harris salutis nome de Usono). La akustiko, bedaŭrinde, ne estis ideala – ja la salono Zamenhof fakte estis ne salono, sed giganta tendo – tamen, ĝi havis klimatizadon, lignan plankon kaj televidekranojn: en la urbo simple ne estis sufiĉe granda kongresejo. Mia edzo, kiel pli sperta kongresano (tio estis jam lia kvara UK), pli filozofie rilatis al la fakto, ke oni povas trafi ne pli ol dekonon de la tuta programo, sed por mi la peno elekti la “ĝustan” programeron estis tro dolora. Multaj kongresanoj eĉ iris de la salono al salono, por trafi almenaŭ peceton de kelkaj samtempe okazantaj programeroj. Ege plaĉis al mi “Kleriga Lundo”, kie la kongresanoj estis ne simple aŭskultantoj, sed aktivaj partoprenantoj de la programo: oni povis imagi sin oficiala tradukisto de Eŭropa Unio, provante traduki oficialan tekston de via preferata EU-lingvo al Esperanto. La kultura programo de la kongreso estis vere admirinda kaj impresa: la programeroj okazis en 17 lokoj de la urbo! Samtempe kun la kongreso okazis internacia muzikfestivalo, kaj estas nekredible, kiom da profesiaj muzikistoj kaj aktoroj kantis kaj aktoris en Esperanto speciale por la kongresanoj! La semajno pasis ege rapide. Malgraŭ certaj mankoj, la kongreso estis bonega, ĝuinda kaj bone preparita, kaj ĝi estis ankaŭ bonega okazo reklami Esperanton en Pollando: pluraj memortabuloj, eldono de multnombraj artikoloj, broŝuroj kaj poŝtkartoj, speciala Zamenhof-traĵno, disko kun informoj kaj kurso de Esperanto kiel aldonaĵo al tutlanda gazeto, malfermo de la belega Esperanto-centro kaj kreo de Esperanta ekskurs-itinero en Bjalistkoko – por mencii nur kelkajn. Mi sincere dankas la organizantojn kaj volontulojn – ili faris nekredoblan laboron! (Sur la foto: kun geamikoj en la kafejo “Esperanto”, la menuoj haveblis ankaŭ en Esperanto)

Ĵenja Amis, estrarano de Esperanto-USA

El nia leterkesto

1. Ni estas Tangshan-a EsperantoAsocio. Hodiaŭ ni skribis leteron al vi kun unu peto. Kurantjare ni festos la 150-an naskiĝtagon de Zamenhof, por memori tiun tagon ni aranĝos ekspozicion en la fino de jaro. Unu el la ekspoziciero estos ekspozicio de poŝtkartoj kaj uzitaj kovertoj de diverslandoj, sed tre bedaŭrinde ni ne havas ilin de via lando. Ĉu vi povas sendi al ni kelkajn da ili de via lando? Se vi bezonos ion de nia lando, ni pretas sendi al vi. Nia adreso: TEA , p/kesto 3, Tangshan Hebei , 063000 Ĉinio.

2. Daniel Asomaning Obiri, studento el Ghana, planas viziti nian landon kaj prelegi tie ĉi, sed li bezonas invit-leteron. Dezirantoj helps al li povas kontakti rete: asomadaniel215@yahoo.com

Adreso (provizora)

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktor' Pajuk
8228 O'Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
www.esperanto-chicago.org/

Estraro:

Prezidanto – Viktoro Pajuk
Vicprezidanto – d-ro Puramo Chong
Eksprezidanto – Roberto Stalzer
Sekretario – Gertrude Novak, MD
Kasisto – Karlo Gunn

MEMBROKOTIZO

Membro-subtenanto ; \$40 jare;
Familia membro : \$30, Regula: \$20
Studenta aŭ pensiula: \$10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer,
Charles Gunn, 828 S. Ada St,
Chicago IL 60607

KUNSIDO

okazas kutime la kvaran mardon de ĉiu monato en:

Sulzer Public Library, 4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL 60625-2101.
Kunvenoj komenciĝas je 7 p.t. en la Suda Konferenca Salono, unua etaĝo.

Jen la informo pri niaj sekvantaj kunsidoj:

22an de Septembro –Kion oni spertis somere?
Membroj rakontas pri siaj travivaĵoj
27an de Oktobro – Davido Kirschbaum gvidas tra la historio de Eŭropo
24an de Novembro – Elekto de nova gvidantaro.
Viktoro rakontos pri sia vojaĝo al Ukrainio
13an de Decembro – Zamenhofa tago en Evanstono

